# La ronda Naztuko

## Erik Tantal

PRO
BONA
KIALO

# La ronda Naztuko

## Erik Tantal

# Enhavo

Antaŭparolo....................................................................................4
La firmao........................................................................................5
Reakcioj.........................................................................................8
Komenco.........................................................................................9
La ideo..........................................................................................11
La studo........................................................................................15
Amaskomunikila frenezo...........................................................18
Politiko..........................................................................................20
En studenta loĝejo.......................................................................22
Tien kaj reen................................................................................26
Protestoj.......................................................................................28
Klaraj Pensantoj..........................................................................30
Intervjuspektaklo........................................................................31
Kontrolo.......................................................................................35
En la restaŭracio.........................................................................37
Polica traserĉo.............................................................................39
En lernejo.....................................................................................41
Pensoj estas liberaj.....................................................................44
En Ministerio...............................................................................47
Girlando........................................................................................49
La premio......................................................................................52
La sekva paŝo...............................................................................54
Kolofono........................................................................................57

# Antaŭparolo

Kiu nur elpensas tiajn ideojn? Tio tute ne ekzistas. Mi jam povas imagi, kiajn komentojn iuj legantoj eble volus komuniki al mi. Sed pensu nur pri tio, kion ni spertis en la lastaj jaroj. Kaj kiu scias, kion ni devos atendi en la estonteco?

Koran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis ideojn por tiu libro kaj helpis korekti ĝin!

Ĉiuj nomoj uzataj en tiu libro estas elpensitaj.

Erik Tantal

# La firmao

Frank metas unu paŝon malrapide kaj penseme antaŭ la alia. Li ne rimarkas la bele aranĝitajn florbedojn en la parko. De hodiaŭ tiu estas lia ĉiutaga vojo al la laboro. Nur kvinminuta promenado de lia loĝejo.

Frank Krause estas 26-jaraĝa. Li ĵus sukcese finis siajn studojn pri komerca administrado kaj transprenis la firmaon de sia forpasinta patro.

Ĉu li sukcesos tie? Tie, kie paperaj naztukoj estis fabrikitaj dum jardekoj?

Naztuka princo, aŭ eĉ naztukulo. Per tiaj esprimoj liaj kunlernantoj mokis lin sur la lerneja korto. Tio estas fora pasinteco. La firmao ĉiam estis sukcesa. Ĉiuj estas nur enviaj! Tiel ĉiam konsolis lin lia patrino. Jes, Frank povas fieri pri sia patro. Sed ĉu li sukcesos gvidi la firmaon sur la ĝusta vojo?

"Bonan matenon, Frank. Kie vi estas kun viaj pensoj?", demandas Anton, lia longjara studenta amiko, kaj ekde hodiaŭ, lia plej proksima kunlaboranto en la firmao.

"Saluton, Anton. Bone, ke vi estas tiel ĝustatempe. Mi vere timas tion. Mi esperas, ke mi ne estos disŝirita."

"Stultaĵo! Vi ja bone konas la firmaon. Vi helpis tiom ofte en la entrepreno de via patro! Eĉ ses-monata staĝo. Tio certe sufiĉos."

Tiu trankviliĝo helpas. Frank profunde enspiras. Anton demonstre malfermas la enirpordon por li kaj lasas lin iri antaŭen.

"Bonan matenon, S-ro Kraŭse. Ĉion bonan por via unua labortago!"

"Koran dankon, S-rino Evers. Ĉu iu jam telefonis?"

"Jes, kompreneble. Mi metis liston sur vian labortablon. Multe da laboro atendas vin."

Frank rapidegas al sia labortablo. Li estas nervoza. Tio estas tute komprenebla.

"S-rino Evers, bonvolu aranĝi tujan kunvenon kun ĉiuj departementaj estroj. Tio estas grava. Kaj vi ankaŭ devas ĉeesti kaj skribi la protokolon."

Post malmultaj minutoj ĉiuj seĝoj en la konferencsalono estas okupitaj. Frank bonvenigas siajn dungitojn kaj tuj komencas la paroladon.

"Karaj Sinjorinoj kaj Sinjoroj, mi verŝajne ne bezonas klarigi tion plue. Ĉiuj ĉeestantoj ĉi tie scias, ke niaj vendoj stagnas. La konkurenco daŭre kreskas. Tio kaŭzas problemojn. Tial mi nun prezentas al vi mian novan koncepton. Ne timu. Ne temas pri maldungoj. Kontraŭe. Se ĉio evoluas kiel planite, ni devos vastiĝi."

Murmurado kaj nekredemo plenigas la aeron. Frank rimarkas, ke lia parolado kaŭzas pli da maltrankvileco ol konfido. Li daŭrigas sian paroladon.

"Ni ne povas simple daŭrigi kiel antaŭe. Ni bezonas ion tute novan. Nia produkto devas klare distingiĝi disde tiu de niaj konkurantoj."

"Kiel tio supozeble funkciu?", demandas la ĉefo de la sekcio por fabrikado, "Ni ja produktas la paperajn naztukojn!"

"Tion ni faros plue. Sed niaj naztukoj ŝanĝiĝos."

Denove maltrankvileco. Nekredema murmurado. Ankaŭ Anton ĵetas demandan rigardon al Frank.

Frank profunde enspiras kaj nun malkaŝas la sekreton.

"Ni produktos novajn naztukojn, kiuj klare diferencas de ĉiuj aliaj. Sed ne per la materialo. Tio restas en la sama kvalito. Estos nur ŝanĝo en la formato. Ni estos la unuaj, kiuj produktas RONDAJN NAZTUKOJN! Ĉiujn kromajn informojn vi trovas en la broŝuro, kiun Sinjorino Evers donas al vi."

## Reakcioj

"Per tio vi certe kaŭzis ion!", komentas Anton. "Kial vi ne donis al mi la broŝuron jam antaŭe?"

"Tio ankaŭ ne kondukus al ia ŝanĝo. Mia decido estas farita jam delonge. Mi eĉ prenis prunton de nia banko."

Anton skuas la kapon, same kiel la plejmulto de la dungitoj.

Kia stultaĵo! Ĉu li iĝis freneza? Kion li nur pensas, tiu snobo! Estos ni, kiuj devos zorgi pri la situacio, kiam la firmao bankrotas!

Tio estas nur la plej sendanĝeraj komentoj de la dungitoj, kiujn Frank kompreneble ne aŭdas. Sed li certe povas imagi tiajn reagojn.

La efektivigo de la planoj estis malfacila. Frank jam atendis tion. Estas necese akiri maŝinojn, kiuj jam

nun eĉ ne ekzistas. La sekcio por varbado devas evolui novajn konceptojn. Ĉi tio bezonas tempon kaj monon. La unuaj rondaj naztukoj aperos verŝajne nur post ses monatoj.

## Komenco

La tempo venis. Frank apenaŭ povas atendi. En la fabrikhalo li ĝoje ricevas la unuan grandan pakaĵon enhavantan la novan produkton. 30 pakaĵetoj, ĉiuj kun dek naztukoj. Ĉiu ronda papertuko kun diametro de 15 centimetroj. Ĝi estas fleksita unufoje. Tio estis la ideo de  Anton. Lia argumento, ke tiel la paketaĵo pli bone taŭgus en la pantalonan poŝon, konvinkis Frank. Krome estas nun pli facile elpreni ĉiun individuan papertukon el la paketaĵo.

Krause-ronda, la naztuko de nia tempo. Klara malhelblua surskribo sur blanka fono, ĉirkaŭita de blua cirklo. Konservativa, tamen alloga dezajno. Blua kaj blanka, ĝuste kiel la pakaĵetoj de lia patro. Anstataŭ rektangula kadro nun kun blua cirklo.

Ankaŭ la varbsekcio elpensis ion. En ĉiuj anoncoj kaj reklamaj filmetoj rulas la ronda naztuko malsupren de monto kaj denove supren. Tiam ĝi renkontas amuze pentritan figuron kun fluanta nazo.

'Krause-ronda, kontraŭ nazkataro!' estas unu de la varbsloganoj.

En alia filmeto famulo klarigas, kial ili decidis uzi la rondan naztukon nun. 'La favorato de la nova epoko estas Krause-ronda. Pro bona kialo!'

Sed tiuj sloganoj ŝajne ne estis aparte konvinkaj. Ĉiukaze la mendoj malkreskis. La produktado devis esti reduktita, ĉar ĉiam pli da pakaĵoj amasiĝis en la magazeno. Frank alfrontas masivan kritikon ĉe unu el la sekvaj kunvenoj.

Nur Anton subtenas lin: "Ĉiu devus esti atendinta tion. Sed ni ne volas forĵeti la ombrelon ĉe la unua signo de pluvo. Troviĝas eĉ klientoj, kiuj mendis pli da paketaĵoj. Al tiu apartenas ekzemple la drogvendejo VOLI."

"Sed ili nur deprenas dek procentojn de nia produktoj!"

"Ĉi tio ne povas daŭri!"

Por Frank estas ege malfacila nun malstreĉi la situacion. Li subite sentas malfortecon en siaj kruroj. Sed li kolektas sin kaj ne montras tion. Per klara voĉo li provas trankviligi sian laborantaron.

"Karaj kunlaborantoj, mi plene komprenas viajn zorgojn. Ankaŭ mi ne estas kontenta pri tiu evoluo. Donu al ni ankoraŭ tempon por kelkaj monatoj. Mi certas, ke baldaŭ la tajdo turniĝos. Ni nuntempe intense laboras pri nova reklama kampanjo. Tiam ĉio ŝanĝiĝos."

Poste la konferenca ĉambro malpleniĝis, Frank restas sidante elĉerpita en sia seĝo. Nur Anton estas apud li.

"Ĉi-foje vi sukcesis, sed nur kun granda malfacileco. Sed kiom longe vi planas trankviligi vian laborantaron nur per malplenaj promesoj?", li demandas.

"Tio estas mia tasko. Tiel rapide unu el la familio Krause ne rezignas. Morgaŭ mi renkontos Tanja. Ŝi laboris kelkajn jarojn en Novjorko kiel fakulo por reklamo. Ŝi sugestis ion vere interesan dum nia lasta telefonado. Akkompanu min morgaŭ. Ni renkontiĝos en ŝia oficejo je la tria posttagmeze.

## La ideo

Tanja vere elpensis ion brilan. Sed ŝi ŝajne hezitas malkovri ĝin. Tial ŝi raportas unue pri siaj spertoj en

Usono. Ŝi sukcesis tie per pluraj reklamaj kampanjoj. Ŝia sukceso estis tiel granda, ke pluraj koncernoj de tiam klopodis dungi ŝin. Estas feliĉo por Frank, ke li povas kontakti ŝin. Li konas Tanja ekde liaj lernejaj tagoj. Li eĉ iam rajtis ĉeesti dancokurson kun ŝi. Sed strange, li ne kapablis plu evoluigi la rilaton kun ŝi.

"Tanja, mi jam informis vin pri niaj problemoj telefone. Ĉu vi vere havas ideon, kiel ni povus ŝanĝi la situacion?"

"Nu, jes, estas iomete malfacile. Kaj mi ne volas, ke nur unu vorto el nia konversacio atingu la publikon. Ĉu vi povas promesi tion?"

"Jes, kompreneble, sed kial?", demandas Frank.

Anton insistas: "Tiel kiel la situacio evoluas nun, ĉi tio ne povas daŭri. Estus bone, se vi konas iun eliron. Kompreneble, vi povas fidi nian diskretecon."

Nun Tanja komencas. Ŝi proponas publiki studon pri la malutileco de la rektangula papernaztuko.

"Kial tio? Ĉu vi ŝercas? Tio efektive ne ekzistas!", kontraŭdiras Frank. Ankaŭ Anton ŝajne ne komprenas tion.

"Nu, ja, kio nun ne okazas, tamen iam okazos. Mi konas iun en Usono, kiu povas eltiri studon el pantalona poŝo. Li jam sukcese prezentis similajn falsitajn studojn al science agnoskitaj institucioj."

"Sed tio ne estas laŭleĝa, ĉu ne? Ne, tion ni ne faros!", atentigas Frank.

Tanja ridetas. "Kia malkuraĝulo! Tia studo ja ne povas damaĝi ion. Ni nur devas garantii absolutan sekretecon."

Ŝajnas, ke Antono varmiĝas al ĉi tiu ideo. "Kiel devus aspekti tiu studo? Kial rektangulaj paper-naztukoj tiam estas malutilaj?"

Evidentiĝas, ke Tanja intertempe ĝuas tiun konver-sacion. Ŝi rigardas rekte en la vizaĝon de Frank kaj demandas:

"Kaj, nun? Estis ja vi, kiu unue havis la ideon pri la rondaj naztukoj. La sola kialo, kiun vi povis elpensi, estis, ke oni devis 'moviĝi kun la tempo'. Sed kial? Tio ne povas konvinki la homojn. Ili bezonas ion firman."

"Vi pravas, sed ĉu ni tial asertu, ke rektangulaj naztukoj kaŭzas malsanojn? Neniu kredos tion", atentigas Frank.

"Ni povas aserti ĉion", emfazas Tanja, "ni nur donu al ĝi bonan kialon. Sed minaci iun per malsano estas, laŭ mia opinio, malbona ideo. Tamen, nia studo devus konkludi, ke rondaj tuketoj estas pli taŭgaj por ŝtopita nazo ol rektangulaj. Sed la vere grava rezulto devus esti nia elkovro, kiun ni trovis hazarde. Ni trovas, ke la malnovaj rektangulaj naztukoj kaŭzas malsukcesojn por homoj. Kompreneble, tio ne estas pruvita, sed la malo ankaŭ ne. Gravas nur studo kun konvinkan statistikon. Jes, ĝi estas falsita, sed tio ne nepre devas malkaŝiĝi. Apenaŭ iu ajn komprenas ion ajn pri statistiko nuntempe."

Frank fine ne havas kontraŭajn argumentojn.

Li konsentas kaj taskigas Tanja-n kontakti ĉi tiun ulon en Usono. Ne devus esti problemoj pri la atendataj kostoj.

# La studo

"Kion vi scias? Ĉu vi jam havas informojn pri la studo? Kaj kion ĝi montras?", demandas Frank senpacience. Tanja trankviligas lin.

"Ne zorgu, Tobi faros tion. Mi ĵus telefonis kun li. La RCT-studo jam estas survoje.

"Kio estas tio? RCT-studo? Ĉu vi povas klarigi tion?"

"RCT venas de Randomized Controlled Trial, tio signifas Hazarda Kontrolita Testo. Dum tio la ekzamenataj homoj estas hazarde asignitaj al la komparataj grupoj. Do, ili ricevas aŭ rondajn aŭ rektangulajn naztukojn."

"Jes, kaj poste?"

"Nu, ja, la homoj ricevas la informon, ke la ĉefa celo de la ekzamenado estas eltrovi, kian efikon la naztukoj havas sur la nazkataro. Krome ili estas petataj plenigi enketilon.

"Kian enketilon?"

"Ni volas montri, ke rektangulaj naztukoj kreskigas malsukcesojn kaj ke nur niaj rondaj taŭgas por sukcesa  vivo. Tial estas demandita, kion la homoj faras dum la ĉiutaga vivo. Tute simplaj aferoj.

Ekzemple, ĉu ili denove faligis glason? Aŭ ĉu ili maltrafis la buson? Aŭ ĉu ili havis bonŝancon en la loterio aŭ dum amrilatoj? Kion mi scias? Estas multegaj eblecoj marki ion sur la formularo."

Iom post iom Frank komprenas la koncepton nun. Tanja daŭrigas la klarigon, ke la homoj devas raporti sian staton telefone.

"Tiam ricevas preferan trak-tadon tiuj, kiuj portas rondajn naztukojn. Ili aŭdas ekzemple, ke nia nova produkto havas mirindan kaj rapidan efikon. Por la aliaj kun la rektangulaj tukoj, oni simple emfazas, ke ilia nazkataro devas esti tute malaperinta antaŭ la raporto.

Tiu malsama traktado de la ekzamenataj personoj certe havas efikon. Averaĝe la nazfluo pli rapide malaperas kiam oni uzas rondajn naztukojn. Kiam montriĝas signifa diferenco inter la du grupoj, la ekzamenado estas haltigita. Tiam oni komparas la enketilojn kaj ankaŭ serĉas tie signifajn diferencojn. Se oni demandis sufiĉajn aferojn, oni certe trovas iun hazardan diferencon. Tiun oni elektas, kaj la aliaj restas sekretaj. Kompreneble ne estas diferenco inter ili.

Rezulte la studo prezentas, ke rondaj naztukoj vere helpis pli bone kontraŭ nazfluo. Sed pli grava por ni estas la supozeble neatendita kromefiko, ke la formo de la naztukoj havas influon al sukceso aŭ malsukceso."

"Mirinde, tio vere impresas min", komentas Anton.

Frank ne estas tiom facile konvinkita.

"Ĉu tia studo ne daŭrus tro longe? Tri monatojn? Aŭ eĉ unu jaron?"

Tanja denove trankviligas lin. "Ne timu. La studo estas jam preta. Ni ja scias, kian rezulton ni bezonas. Tial ni uzos la version, kiun Tobi elpensis tute memstare. Sed li estus farinta tion precize kiel mi klarigis. Se li efektive farus tion, la prezo estus multe pli alta. Tamen, ni devus atendi almenaŭ plian monaton. Tiam ni povas publiki, ke la studo estis farita en Usono antaŭ duonjaron. Temas ja pri kvar mil homoj, kiuj estis demanditaj."

"Kaj kia estas la fina rezulto?", demandas Frank senpacience.

Tanja ridetas. "Nia studo montras kun 95%-a statistika certeco, ke ekzemple rondaj naztukoj

kaŭzas je 36% malpli da hejmaj akcidentoj ol la rektangulaj. Estas simile kun aliaj malsukcesoj."

## Amaskomunikila frenezo

La fronta paĝo de la ĵurnalo "La Rigardo" havas dikan, nigran titollinion:

LA PRUVO: RONDAJ NAZTUKOJ PLI BONAJ!

Sube prezentiĝas la vizaĝoj de tri tre konataj personoj, de la fama modomodelo Mira, de la pinta atleto Ole kaj eĉ de la belega dukino Karina.

Krome estas noto, ke iliaj ekskluzivaj deklaroj troveblas sur paĝo kvin.

Mira ekzemple raportas, ke ŝi havis tri pozitivajn spertojn jam en la unua tago post unua uzo de rondaj naztukoj. Tiun tagon ŝi estis ĝustatempa por la fotosesio. Ŝian alvenon kaŭzis konsiderindan surprizon ĉe ĉiuj. Poste ŝi ricevis profitdonan kontrakton, por kio ŝi longe laboris, sed jam perdis ĉian esperon. Fine ŝia fianĉo donis al ŝi valoran donacon, pri kiu ŝi preferas ne paroli pro privataj kaŭzoj.

Ankaŭ la pinta atleto Ole kaj la dukino Karina raportas pri similaj travivaĵoj.

Je la fundo de la paĝo troviĝas detala komento, la faka opinio de Profesoro Kramer.

Li skribas unufoje semajne pri aktualaj novaĵoj el la scienco kaj estas konsiderata aparte kompetenta.

Rilate la malkovrojn pri la ronda naztuko li kondukas la leganton reen al la frua historio de la homaro.

Li klarigas, ke tiam eĉ ne ekzistis rektangulaj aĵoj. Kontraste, niaj prauloj konsideris ĉion rondan bela kaj dezirinda. Eble, ke tio estas konservita en niaj genoj, li opinias. Tial estas kompreneble, ke usona laborgrupo povas demonstri tion per la ekzemplo de la rondaj naztukoj.

Ankaŭ televido traktas tiun temon. La fabrikantoj de la malnovaj, rektangulaj papertukoj raportas gravan malkreskon de mendoj. Ĉio pro la 'Rektangul-induktita misfunkcio' (RIM). Tiu nova laŭmoda vorto pridubas ĉion, kio estas rektangula.

Sed Frank ne povas savi sin pro multaj mendoj kaj petoj. En lia firmao la produktado postulas kromlaboron. Ĉia kritiko de la laborantaro estas silentigita.

En 'sociaj retoj' pli kaj pli homoj anoncas siajn spertojn. Aŭdiĝas ekzemple: "Kiam mi ankoraŭ uzis

rektangulajn naztukojn, ĉio misfunkciis. Sed nun mi finfine lernis kiel fari pli bone." Aŭ: "Ekde mi uzas rondajn naztukojn, ne nur mia nazfluo pli rapide malaperas. Mi krome havas  plian plezuron en mia ĉiutaga vivo."

Influantoj demonstreme tenas rondajn naztukojn al la fotilo. Iliaj haŝetiketiloj estas:

#ForiguAngulojn, #RestuRonda aŭ #Ronda Sana

"Mi baldaŭ ne plu povas elteni tiun frenezon", plendas Frank.

## Politiko

Grandaj homamasoj en la enirhalo de la Hotelo ĉe la Parko. La partio 'Blanka Greno' kunvokis membrokunsidon. La kialo estas evidenta. Estas ĉiam malpli da subteno por la partio inter la loĝantaro. Kaj venontmonate okazos la sekvaj lokaj balotoj.

"Ni bezonas novan temon. Ion, kio allogas tiujn, kiuj ankoraŭ ne voĉdonis", postulas la prezidanto.

Jes, estas multaj proponoj, sed inter ili neniu vere interesa. Plibonigo de la trafika situacio, pli da

pureco en publikaj lokoj kaj stratoj, pageblaj lupagoj, kaj tiel plu.

"Tion ni konas. Kaj tio estas ankaŭ la celo de niaj konkurantoj. Ĉu vi ne havas ion novan?", grumblas la ĝenerala sekretario.

De la malantaŭa vico finfine aŭdiĝas parolado, kiu estas intense debatita.

"Ĉu ni ne ankaŭ pledu favore al rondaj naztukoj?"

Komence superregas pleje aĉaj kaj malestimaj komentoj.

"Kia stultaĵo!", "Tio ne apartenas al la membro-kunveno!". "Kaj poste ni eĉ diskutas pri spiralaj trinkpajleroj!"

Iom post iom la komentoj iĝas pli objektivaj.

"Tio estas certe stranga sugesto. Sed ankaŭ certas, ke ni altirus pli da atento."

"Jes, kaj tia propono ja ne estus damaĝa. Ni prezentu la aferon kun palpebrumo kaj rideto, tiam ni eĉ montros, ke ni havas senton de humoro."

Finfine oni faras voĉdonon pri tiu temo. La partio decidas aĉeti rondajn papernaztukojn kun la

emblemo de la partio sur ili. Tiuj estu uzataj kiel varbmaterialo ĉe ĉiuj informstandoj.

## En studenta loĝejo

Trankvila matenmaĝo aspektas tute alimaniere. Kion alian vi atendus de komuna loĝejo? Kvar studentoj. Ĉiu kun sia propra personeco kaj pensmaniero. Klara, Emily, Jonas kaj Leon. Ili nur tre malofte matenmaĝas kune. Sed hodiaŭ estas escepto. Neniu devas iri al la universitato dimanĉe. Tial ĉiuj promesis esti ĉe la tablo ĝustatempe je la naŭa horo hodiaŭ.

"Kie estas Jonas? Ĉu li ankoraŭ dormas?", demandas Emily.

"Li baldaŭ venos. Li estas ankoraŭ en la banĉambro. Atendu iomete", proponas Leon.

Jonas ja sukcesas. Tamen, li ne sidiĝas kun la aliaj.

"Kio okazis? Ni volis matenmaĝi nun kune", memorigas lin Klara.

Jonas havas alian planon. "Atendu! Vi devas aŭskulti!"

Li kaptas sian poŝtelefonon. Malgraŭ protestoj li venkas kaj ĉiuj devas aŭskulti la reston de la novaĵoj kaj la veterraporto. Neniu komprenas kial tio estas necese hodiaŭ. Sed nun ili levas la orelojn.

"Tio estas la Sabata Matena-Talk. Ĉiam freŝa kaj aktuala! Hodiaŭ kun la moderatoro Henrik. Nia interparolanto estas Eduard Wollner de la partio 'Blanka Greno'. Bonegan matenon, Sinjoro Wollner. Estas nun via vico!"

"Jes, koran dankon. Kaj dankon ankaŭ al la multaj samcivitanoj, kiuj voĉdonis por ni. Ni sukcesis pliboniĝiĝi je 18 procentoj. Neniu antaŭe atingis tiun rezulton."

"Kompreneble. Gratulon. Al kio vi atribuas tion, Sinjoro Wollner?"

"Mi ne povas tion pruvi. Miaopinie, ee- mi estas fakte tute certa, -ee"

"Nu, kio, Sinjoro Wollner?"

"Pardonu min, mia nazo."

Moderatoro Henrik tuj helpas: "Ho, ho, tio ne estas la fino de la mondo, mallonga paŭzo. Freŝa muziko dum Sabata Matena-Talk!"

Leon uzas tiun paŭzon kaj prenas bulkon. Ankaŭ Klara kaj Emily servas al si iom da bongusta fruktosalato.

"Kaj por kio estas tio?", plendas Leon. Sed antaŭ ol li povas mordi pecon de la bulko, la radioprogramo rekomenciĝas.

"Jen ni revenas denove. La Sabata Matena-Talk. Hodiaŭ kun moderatoro Henrik kaj Sinjoro Wollner de la partio 'Blanka Greno'. Kie ni estis antaŭ la paŭzo, Sinjoro Wollner?"

"Nu, mi devis purigi mian nazon kaj tial serĉis mian novan pakaĵon da naztukoj."

"Tion vi devas klarigi al niaj aŭskultantoj, Sinjoro Wollner. Kiajn novajn naztukojn?"

"Ni nun nur uzas la rondajn. Mi certas, ke aferoj pliboniĝis por ni ekde kiam ni ĉiuj de la partio ricevis tiujn rondajn naztukojn. Tial ni kreskis je 18 procentoj."

Sinjoro Wollner iĝas pli kaj pli entuziasma. Aŭdiĝas preskaŭ kiel reklama aranĝo de la firmao Krause. Niaj studentoj apenaŭ plu aŭskultas. Escepto Jonas.

"Aŭskultu nur ankoraŭ unu momenton. Tuj ĝi venas. Tio estis anoncita jam hieraŭan vesperon."

Sinjoro Wollner daŭrigas: "Vi devas ĝui tion. 18 procentoj. Tion ni bezonas ankaŭ por nia tuta lando. Ĉie la industrio ŝrumpas. Tio ne estas akceptebla. Tial nia partio decidis koncentriĝi pli forte al la ronda naztuko.

"Kio signifas tio?", demandas la moderatoro.

"Nu, ja. Ekspertoj klare konsentas, ke la ronda naztuko certe kaŭzas malpli da malsukcesojn. Tion montras intertempe pliaj studoj. Kaj tiam estas tute racie, ke la registaro ankaŭ certigu, ke ĉiu civitano kaj la tuta lando profitu el tio. Do, ni subtenos leĝon, kiu konsekvence malpermesas la posedon de rektangulaj naztukoj."

Tio sufiĉas. Jonas malŝaltas la radioaparaton kaj rigardas demande ĉirkaŭen.

"Ĉu vi aŭdis tion? Tio ne povas esti vera. Ĉu ili freneziĝis?"

Ankaŭ la kunstudentoj estas ŝokitaj. Neniu povas imagi, ke la registaro aprobus tian leĝon. Sed jam du horojn poste, la planita voĉdonado en la

parlamento estas anoncita. La leĝo estos akceptita jam merkredon.

## Tien kaj reen

Estas nur malmulte da tempo por diskutoj. Tiuj kompreneble okazas. Ne nur ĉe la biertabloj, en preskaŭ ĉiu hejmo. Lundon, je plej bona temo por elsendaĵo, la Ministro por Scienco prezentas sian klarigon.

"Karaj kuncivitanoj. Ne zorgu. Hieraŭ estis la voĉdonado pri la naztuk-leĝo. Mi estas firme konvinkita, ke tiu leĝo ne trovos la plimulton. Tio rezultiĝas pro la sana ordinara racio. Rektangula aŭ ronda. Tio estas egale. Kun aŭ sen studoj. Ni devas konservi nian klaran pensadon. Koran dankon por via atento!"

Por multaj homoj tiuj vortoj sonas trankviligaj. Kial ili devus forĵeti ĉiujn paketaĵojn kun naztukoj, kiujn ili aĉetis nur antaŭ unu monato? Nur, ĉar ili enhavas rektangulajn papertukojn? Tio estas opinio, dividita de multaj. Tiuj politikistoj devus pli bone zorgi pri la veraj bezonoj de la popolo, postulas ili.

Firmaoj, kiuj antaŭe produktis rektangulajn naztukojn, ankaŭ komencas protesti. Kial rekonstrui plenajn instalaĵojn por fabrikado? Ili estis nur antaŭ nelonge modernigitaj. Nova konstruado bezonus multe da mono. Kaj kio okazas, se iu alia postulos ovalajn papertukojn morgaŭ?

Sed tiuj kontraŭuloj kaj kritikistoj evidente ne havas ŝancon. Nur dudek kvar horoj post sia parolado la Ministro por Scienco denove faras paroladon.

"Mi konscias, ke mi nun eble konfuzas kelkajn el vi. Sed ne ekzistas alia solvo. Mi devas korekti mian opinion de la pasinta lundo. Sciencaj studoj montras kun alta grado de certeco, ke efektive estas pli bone uzi la rondan naztukon. Do, ne lasu vin trompi. Forĵetu ĉiujn malnovajn rektangulajn. Koran dankon por via kompreno."

Ankaŭ la kanceliero petas parolon. Marde, antaŭ la planita voĉdonado, preskaŭ ĉiuj civitanoj sidas antaŭ la televidaparato kaj aŭskultas lin:

"Karaj kuncivitanoj. Temas pri respondeco. Kiel kanceliero de ĉi tiu lando mi ĵuris labori por la bonfarto de ĉi tiu lando. Kaj tion mi faras per mia tuta koro. Tial mi proponis, ke nia parlamento ankaŭ montru respondecon. La morgaŭ voĉdono okazos

sen partia disciplino. Ĉiu delegito submetiĝas nur al sia konscienco. Mi esperas, ke ĉiu konscias pri tio kaj voĉdonos por la leĝo al la uzo de la ronda naztuko. Ĝenerala interkonsento estas grava. Nur tiam ni ĉiuj havos profiton de tio. Koran dankon por via atento."

## Protestoj

"Estas tempo. Ni devas fari ion", postulas Klara. Ŝi ĵus aŭdis la novaĵon pri la voĉdonado en la parlamento. Kiel atendite estis malmultaj malsamopiniaj voĉdonoj.

Ankaŭ Leon ne konsentas pri tio. "Ni ne toleros tion! Sabate je la dek unua horo estos manifestacio en la urbocentro. La stacia placo estas la renkontejo. Tien ni iros."

Ne nur ĉi tie estas protestoj. Tra la tuta lando formiĝas movado kontraŭ la leĝo pri la naztukoj. La motoro de tiu movado estas la aktiva grupo de la Klaraj Pensantoj. Ili estas ĉefe studentoj. Firmaoj, kiuj volas daŭre produkti la rektangulajn naztukojn, subtenas ilin.

Emily kaj Jonas alvenas ĝustatempe je la dek unua horo sur la staca placo. Ĉirkaŭ tricent manifestantoj, plejparte junaj , atendas antaŭ scenejo. Preskaŭ ĉiu kunportis kartonan ŝildon kun sia propra surskribo. Ekzemple: 'Ĉesu tiun stultaĵon!', 'Rektangula = Alloga', 'Ronda kaj blanka - Aĉa kaj Stulta'

Ĉirkaŭ mil policanoj ĉirkaŭas la placon. Kaj ĉirkaŭ kvincent kontraŭ-protestantoj faras multe da bruo. Sur iliaj ŝildoj legeblas 'RestuRondaj', 'For la rektangulojn!', 'Ronda = Sana'

Malrapide la protestantoj ekmoviĝas. La polico tenas la rivalajn grupojn apartaj.

La grupo de la Klaraj Pensantoj tute ne estas kontenta. Kial venis tiom malmultaj subtenantoj? Jonas marŝas apud maljunulo kun griza barbo. Li portas la ŝildon 'Por nia libereco!'. Ili ambaŭ parolas kaj Jonas aŭdas, ke la aktivuloj renkontiĝas hodiaŭ vespere en la kela restoracio de la urbodomo. Tie la aktuala leĝo pri la naztukoj estos detale diskutata. Jonas ankaŭ volas veni. Li informas siajn amikojn el la komuna loĝejo.

## Klaraj Pensantoj

Ili jam sidas ĉe la longa tablo en la restaŭracio. La aktivuloj de la Klaraj Pensantoj. Bernd ne longe atendas per la bonvenigo. Li voĉlegas la tekston de la ĵus akceptita leĝo. Estas longa teksto. Kelkaj partoj restas bone en la memoro. Ekzemple:

"Kunporti rektangulajn naztukojn estas malpermesite en ĉiuj publikaj lokoj. Post unua averto, monpuno de €100 estos aplikata; pro ripetaj deliktoj, la monpuno povas atingi ĝis €1000."

Aŭ: "Pro la aktuala malbona ekonomia situacio la devo, porti kaj uzi rondajn naztukojn, kiel la nova leĝo postulas, devas esti konsekvence realigita. Ĉar la leĝo deklaras, ke ĉiu, kiu publike aprobas rektangulajn naztukojn, malgravigas ilian danĝerojn aŭ neas la efikecon de rondaj naztukoj, faras krimon."

Krome legeblas: "Por prosperigi la uzon de la ronda naztuko ĉiu civitano povas ricevi mansaketon kun ŝnuro por porti ĝin ĉirkaŭ la kolo. Tiun mansaketon liveros senpage ĉiuj apotekoj. En ĝi estas spaco por du duoncirklaj pakaĵetoj."

La plej aĉaj linioj estas la jenaj: "La polico rajtas ĉiam kontroli la poŝojn kaj la vestaĵon de la civitanoj sen iu ajn aparta kialo. La efektivigo konsideros la sekson de la ekzamenataj personoj."

La diskuto ĵus pri ĉi tiu regulo ne volas ĉesi. Fine Bernd fermas la kunvenon kun la vortoj: "Ni atendu. Li vidos kiom da homoj deprenas tiun senkostan mansaketon. Tiam estos klare, kiom da subtenantoj ni havos."

## Intervjuspektaklo

Bernd ne tute scias kion fari per siaj manoj. Estas rekta televidelsendo. Li sidas sur tiu stranga seĝo sur la scenejo de la televidstacio.

Apud li ĉe la tablo tri diskutpartneroj. La moderatorino Melanie kun helverda jako bonvenigas la partoprenantojn kaj precipe la multnombran aŭskultantaron. Ili tuj aplaŭdas ekzaltite.

"Rekte en radio kaj televido! Kaj vere aktuala. Hodiaŭ kun Bernd Breder de la Klaraj Pensantoj. Apud li Frank Krause. Mi verŝajne ne bezonas prezenti lin plu. Nia aparta gasto la Dukino Karina

kaj kompreneble nia eksperto Profesoro Kramer. Koran dankon, ke vi ĉiuj venis ĉi tien."

Denove tondranta aplaŭdo, kvankam la konversacio ankoraŭ ne komenciĝis.

"Vi verŝajne jam konas nian temon por hodiaŭ. La Ronda Naztuko!". La kamerao proksimiĝas al Frank, kiu ridetas trostreĉita. La kameraisto tuj ŝanĝas la fokuson al Dukino Karina. Ŝia mimiko estas kompreneble pli alloga. Ŝi profesie montras sian plej belan rideton. Profesoro Kramer, kiel jam plej multaj homoj scias, aspektas grumblema kaj malkontenta, kaj Bernd ne povas kaŝi sian nervozecon.

"Dukino Karina, bonvolu diru al nia spektantaro kion vi pensas pri la ronda naztuko?", demandas la moderatorino.

Sed la dukino eĉ ne respondas. Ŝi malfermas sian rondan mansaketon kaj eltiras rondan naztukon, svingas ĝin ĉirkaŭe, kaj per eleganta movo de la brako alportas ĝin al la pinto de sia nazo.

La spektantoj tuj reagas kaj aplaŭdas.

"Koran dankon, Dukino, tio estis klara deklaro. Kaj nun estas via vico, Sinjoro Breder."

Bernd koncentriĝas. Kion li nun diru? Sed li ja scias, ke tio estas granda ŝanco por li kaj la asocio de la Klaraj Pensantoj. Do, li devas kunlabori, vole, nevole. Ankaŭ li tiras rondan naztukon el la poŝo, montras ĝin dirante:

"Mia naztuko iam aspektis alimaniere. Mi tute ne komprenas, kial ni ne plu rajtas uzi la malnovajn rektangulajn."

Ĉifoje ne estas aplaŭdo. Kelkaj spektantoj eĉ krias malaproban 'Buuuu'.

"Ĉu vi permesas, ke mi parolas?", demandas Profesoro Kramer.

La moderatorino Melanie tuj kuraĝigas la profesoron:

"Kompreneble. Komencu. Vi estas ja nia eksperto."

"Jes, estas mirige, kiel rapide nia loĝantaro akceptis tiun novan produkton. Estas tute klare, ke ni nun estas sur la ĝusta vojo. Mi nur ne komprenas, kial ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj kontraŭagas kaj tamen nomiĝas Klaraj Pensantoj.

Ĉifoje la aplaŭdo ŝajne estas eĉ pli laŭta ol kiam la dukino reagis. Moderatorino Melanie turnas sin nun al Frank.

"Sinjoro Krause, kia estas via vidpunkto?"

"Jes, jes, nia studo estis tute klara. Ni testis kvar mil personojn."

Murmuro de aprobo ondetas tra la halo.

"Sed tio estis ja nur unu studo. „Ĉu ni ne devus ripeti ĝin nur por sekureco?“ Bernd demandis ekscitite.

Profesoro Kramer kontraŭas: "Kion ni refaru? Tio estis perfekta RCT-studo, randomigita, kontrolita testo. La rezulto havas statistikan fidnivelon de 95 procentoj. Ĉu vi ankoraŭ kredas, ke la mondo estas disko, Sinjoro Breder?"

Bernd volas tuj respondi. Sed antaŭ ol li povas malfermi sian buŝon, la moderatorino interrompas lin.

"Nu, Sinjoro Breder. Ĉu estas vera, ke en via asocio estas multaj kiuj kredas al tiaj konspiraj teorioj?"

Denove Bernd ne havas ŝancon. La diskutrondo iĝas pli kaj pli neobjektiva. La publiko, tamen, ŝajnas

ĝui la situacion. Unu  kontraŭ tri. Fakte kvar, ĉar la moderatorino evidente ne estas neŭtrala.

## Kontrolo

La florbedoj en la parko ne plu estas allogaj. Frank preterpaŝas sen atenti ilin. Venis aŭtuno. Frank daŭre ŝatas ĉiutage piediri al sia laborloko, kvankam fariĝis kutimo por li, ke la ŝoforo zorgas pri lia transporto en la firmaa aŭto.

Lia firmao evoluiĝis tre bone. Estas multaj mendoj, ĉar la tuta lando nun aĉetas la produkton. Estas ankaŭ bone, ke la unua pakaĵeto estis patentita tuj de la komenco. Tial, lia firmao estas finance sekura.

Ĉio ĉi trairas lian kapon survoje al la laboro. Li eĉ pensas pri finfine proponi geedziĝon al Tanja. En la lastaj monatoj la du pli proksimiĝis. Li vidas ŝin nun ĉiutage ne nur en la sekcio por varbado sed ankaŭ ĉe sia hejmo.

Elirante la parkon, Frank preterpasis florbutikon. Ĉi tie estas multaj homoj, kiuj atendas en vico. Ĉu li hodiaŭ aĉetu bukedon da ruĝaj rozoj por Tanja? Li ankoraŭ havas iom da tempo por aliĝi al la vico. Li atendas post maljuna virino. Ŝi rigardas lin

suspektinde de kapo ĝis piedfingroj. Frank ne komprenas kial. Finfine, li ne plu povas elteni tion. Iomete malafable li demandas: "Kial vi tiel rigardas? Ĉu io misas kun mia mantelo?"

La maljunulino kliniĝas al li flustrante: "Kie estas via ronda mansaketo? Tio vere ne devus gravi al mi. Sed ĉu vi ne havas iun?"

Nur nun komprenas Frank kion pensas la maljuna virino. Ankaŭ li scias pri la ofertoj de la apotekoj. Sed li ĝis nun ne havis tempon zorgi pri tio. Krome, li ne ŝatas porti tian mansaketon ĉirkaŭ sia kokso la tutan tempon. Ĉu li estas eĉ devigita fari tion? Li afable dankas al la maljunulino kaj finfine aĉetas la florbukedon.

"Ĉu tio estas por mi?", demandas lia sekretarino kokete. Sed kompreneble ŝi scias, kiu ricevos la rozojn.

"Ho, ne, Sinjorino Evers. Ĉi-foje ne. Sed ĉu vi povus preni unu el tiuj rondajn mansaketojn el la apoteko por mi? Mi jam subskribis la formularon kun la konfirmo de ricevo.

"Kompreneble, Sinjoro Krause. Mi volonte faros tion. Eble mi eĉ iam ricevos florbukedon de vi."

Sed la ronda mansaketo por naztukoj ne plu estas havebla nun. Pro alta postulo la homoj devos atendi pliajn unu ĝis du monatojn. Tio montras, ke la plej multaj homoj nun akceptas la rondan naztukon.

## En la restaŭracio

La grupo de la Klaraj Pensantoj fariĝis pli malgranda. Hodiaŭ estas nur ses, kiuj sidas kune ĉe la longa tablo. Bernd raportas pri la evoluoj de la lastaj tagoj.

"Ja, bedaŭrinde tio estas tiel. Oni povas vidi tion per la rondaj mansaketoj. Ni ricevas nuntempe apenaŭ subtenon."

Jonas, kiu denove partoprenas, demandas: "Kio pri la grupoj en la aliaj urboj?"

Tie la situacio estas sama. Ŝajnas, ke restas tre malmultaj, kiuj volas fidi sian propran juĝon. Estas eĉ ne malmultaj, kiuj evidente ŝatas raporti homojn, kiam tiuj ankoraŭ uzas rektangulajn naztukojn.

La maljuna viro kun la longa, griza barbo rakontas: "Imagu nur. Ĉe bushaltejo estas patrino, kiu purigas la nazon de sia etulo kun rektangula naztuko. Apude staras viro, kiu vidas tion kaj tuj kuras al hazarde

preterpasanta policano. La virino nur ricevis averton. Sed kio ankoraŭ okazos al ni en la estonteco?"

"Mi ankaŭ estis kontrolita", aldonas alia, "Feliĉe mi havis nur rondajn naztukojn en mia poŝo. Sed estas vere stranga sento, kiam vi estas palpata de policano."

Bernd konfirmas, ke li jam ricevis multajn similajn raportojn. Li scias tion, sed ne helpas, se oni nur plendas pri tiaj aferoj.

"Ni devas pridubi la validecon de tiu nova leĝo.", li postulas.

Tiu propono ricevas ĝeneralan aprobon. Kun helpo de advokato, oni petos revizion de la studo. Estas dubinda ĉu tiu studo efektive estis farita laŭ sciencaj normoj. Bernd petas la protokolanton, doni al ĉiu membro de la grupo kopion de la hodiaŭa kunvena protokolo. Unu ekzemplero estos eĉ sendita al la ĉefredaktoro de la loka gazeto. Bernd kredas: "Ni havas nenion por kaŝi."

## Polica traserĉo

Kiu sonorigas tiel frumatene ĉe la pordo? Bernd ankoraŭ matenmanĝas. Malfermante la enirpordon, la lasta manĝeto restas preskaŭ fiksita en lia gorĝo. Antaŭ li staras uniformita policano akompanata de kolegino kaj speciala operacia unuo kun kvar armitaj oficiroj portantaj nigrajn maskojn.

"Malfermu la pordon, Sinjoro Breder. Ni havas ordonon por traserĉi vian loĝejon. Lasu nin eniri."

"Tio estas certe eraro. Pri kio oni akuzas min?", demandas Bernd.

"Legu ĝin mem. Jen ĝi estas. Ekzistas suspekto, ke vi malobservis la novan leĝon pri naztukoj."

"Tio ne eblas. Mi nur kunprenas rondajn naztukojn kiam mi forlasas la loĝejon. Mi uzas la malnovajn rektangulajn, kiujn mi ankoraŭ havas, nur kiel viŝtukojn en la kuirejo."

"Tion, kion vi faras kun viaj malnovaj naztukoj, ne estas nia afero. Sed ni havas bone fonditajn indikojn, ke vi disvastigas malverajn informojn pri la nova leĝo. Tial ni devas kontroli vian labortablon, kunporti vian komputilon kaj ankaŭ vian poŝtelefonon."

"Sed vi ne rajtas fari tion! Mi ja bezonas tiujn aparatojn."

"Ne zorgu. Ni simple portos ilin al la policejo. Post analizo ni redonos ĉion al vi. Do, montru al ni vian labortablon."

Bernd scias, ke estas pli bone esti kunlaborema dum la traserĉado. Li kondukas la policanojn en sian laborĉambron.

"Jen ĝi estas", vokas la policanino. Ŝi kaptas la protokolon, kiu troviĝas ankoraŭ en la fako de la presilo.

Nun la oficistoj ŝajne estas kontentaj. Ili ne plu volas kunporti la aparatojn. Ili konfiskas nur la protokolon de la lasta klubkunveno. La policanoj ĝentile adiaŭas: "Ĝis revido, Sinjoro Breder. Vi aŭdos de ni."

Bernd nun perdis sian apetiton. Li ordigas la manĝotablon.

Kio nun?

Li ne povas atendi ĝis la venonta regula klubkunveno. Tial, li tuj informas ĉiujn membrojn de

la asocio kaj invitas ilin al kunveno en la restoracio ĉi-vespere.

Tamen, nenio el ĉi tio povas ŝanĝi la verdikton, kiun Bernd ricevas tri tagojn post kiam lia loĝejo estas traserĉita.

En la dokumento staras la akuzo, ke la asocio de la Klaraj Pensantoj pridubas la validecon de la leĝo pri la naztukoj kaj eĉ pledas por la daŭra uzado de la malnovaj rektangulaj. Se tiaj deklaroj ripetiĝus, la klubo povus alfronti malpermeson. Tamen, ĉar temas pri unufoja delikto, nur monpuno de € 3000 estas aplikata.

## En lernejo

La lernantoj de klaso 10c scivoleme rigardas la ekranon montrantan la ŝanĝojn en la horaro. La kvara horo sendube promesas esti tre interesa. Ili legas, ke nova instruisto, nomita Leon Berger, ofertas anstataŭan lecionon.

Leono ricevis instruistan taskon dum tri horoj semajne. Tio estas nur malgranda laboro, sed ĝi ne konfliktas kun liaj universitataj eventoj.

Li salutas la klason. Dudek kvar knaboj kaj knabinoj rigardas lin scivoleme. La hodiaŭa temo estas 'Libereco de la opinioj'. Leon ne elpensis tion. Estis la klasinstruisto kiu fiksis tion dum la lasta semajno.

Leon komencas:

"Kion vi pensas? Ĉu futbalistoj estu suspenditaj se la polico kaptas ilin parto-prenante en kontraŭleĝa stratvetkuro?"

Tio verŝajne ne estas optimuma ekzemplo, sed li devas ja komenci ie. Ne antendante la respondojn li aldonas duan ekzemplon.

"Kion vi pensas? Ĉu muzika prezentado de la fama kantistino Eve M. estu malpermesita ĉar ŝi havas teruran voĉon?"

Tio kaŭzas ridon kaj Leon ricevas multajn komentojn.

"Kaj kion vi pensas? Ĉu estas permesite diri, ke ministro A Bo Co estas korupta porko kaj ke estus pli bone lin pendigi?"

Unu el la plej lertaj lernantoj petas parolon kaj diras:

"Kiun vi celas per A Bo Co? Vi verŝajne ne volas riski proceson!"

Leon ridetas. Li estas feliĉa, ke li povis sukcese prezenti tiun temon al klaso, kiun li neniam antaŭe renkontis.

Poste aperas ankoraŭ multaj pliaj komentoj. Leon petas ĉiujn noti informojn pri almenaŭ tri ekzemploj.

Nu li havas etan paŭzon por spiri. Sed nelonge. Tiu lerta lernanto denove petas parolon:

"Sinjoro Berger, kion vi pensas pri la nova leĝo pri naztukoj?"

Leono glutas malfacile. Li ne estis preparita por tio. Sed post iom da hezito, li alfrontas la demandon.

"Honeste dirite, mi havas dubojn pri tio. Mi pensas, sed tio estas nur mia persona opinio, ke ne estas danĝera purigi vian nazon per rektangulaj naztukoj.

Denove lia deklaro kaŭzas ĝeneralan amuzon. Sed nun estas la fino de la instruhoro. Li ne scias, ĉu li havas la ŝancon denove esti en tiu klaso dum la venonta tempo. Hodiaŭ li forlasas la lernejon. Li ricevis la taskon instrui la sekvan anstataŭan lecionon postmorgaŭ.

Sed jam la venontan tagon la lernejestro telefonas al li.

"Sinjoro Berger, bonvolu veni unu horon pli frue morgaŭ al mia oficejo. Ni bezonas diskuti ion."

Leon demandas sin, ĉu li eble faris ion malĝustan. Sed li ne trovas ion. Kontraŭe. Li ja bonege travivis la lastan instruhoron, ĉu ne?

En la oficejo de la lernejestro li estas instrukciita alie. Unu lernanto de la klaso rakontis pri la anstataŭiga leciono al sia patro. Tiu prenis la komenton de Leono pri la naztuko-leĝo kiel okazon por telefoni al la lernejestro.

"Tiel estas tio, Sinjoro Berger. Vi estas pagita de ni. Kaj ni havas ordonon de la lerneja aŭtoritato instrui al la gelernantoj, ke rektangula nun estas danĝera. Oni ĉiuokaze uzu rondajn naztukojn kaj kompreneble ankaŭ varbi por tio."

"Sed, kion mi devus esti farinta? La gelernantoj ja petis de mi mian propran opinion."

"Ne estu tiel naiva. Se vi ne komprenis min, vi estas en la malĝusta loko. Trovu al vi alian laboron!"

## Pensoj estas liberaj

En la departemento 'Sociaj Aferoj', la departement-estro Kruse kunvokas siajn kolegojn.

"Ni ne toleras tion. Tiuj Klaraj Pensantoj iĝas pli kaj pli malbonaj. Ili nun eĉ provas pridubi la leĝon pri naztukoj. Ni devas ĉesigi tion. Mi ne komprenas, kial ili devas pagi nur monpunon."

Post tiu parolado, li ordonas al sia fakoficisto tuj registrigi akuzon kontraŭ la restoracio, kie la Klaraj Pensantoj renkontiĝas. Plej bone estus por li tuj fermi la restoracion, ĉar tie evidente oni disvastigis falsajn raportojn pri la naztuk-leĝo.

Alia dungito ricevas instrukcion, akiri pli detalajn informojn pri la studo. Li devas ekscii, ĉu tiu studo estas efektive science fondita.

La loka gazetaro raportas ne nur pri la lasta kunveno de la Klaraj Pensantoj.

Ĝi traktas ankaŭ la denuncon de la departemento 'Sociaj Aferoj'. Jen la titollinioj, kiuj aperas:

KONSPIRO EN LA RESTORACIO

LA KLARAJ PENSANTOJ PLANAS PUĈON

Neniu atendis tion. Sed subite kreskas la subteno por la grupo de la Klaraj Pensantoj. Ĉe la sekvanta kunveno estas okupita ne nur la longa tablo sed ne

estas libera seĝo en la tuta halo. La nombro da starantoj ne estas kalkulebla.

"Ni estas ĉiusemajne ĉi tie en nia restoracio. Tion ni ne lasos forpreni de ni!", plendas iu laŭte. Li estas membro de la boŭloklubo, kiu jam de multaj jaroj uzas la boŭlejon en la kelo. Ankaŭ aliaj, kies politikaj inklinoj eĉ distingeblas el iliaj rondaj mansaketoj, ankaŭ komencas esprimi siajn opiniojn.

"Lasu la Klaraj Pensantoj pensi kion ili volas. Ni ja vivas en libera lando!"

Jonas kaptas la okazon. Li hazarde kunportis sian gitaron, ĉar li estis en muzika lernejo antaŭ tiu kunveno.

Nun li stariĝas sur seĝo kaj komencas ludi la konatan kanton 'La pensoj estas liberaj'. La ĉeestantoj ricevas anserhaŭton. Ĉiu ekstaras kaj kunkantas. La raportisto de la loka gazeto ankaŭ ĉeestas. Lia raporto pri tiu ĉi kunveno aperas en la gazeto kaj kompreneble kaŭzas grandan reagon en la departemento por sociaj aferoj.

## En Ministerio

Egon Schmidt, la estro de la Ministerio pri Internaj Aferoj, legas sekretan mesaĝon kun maltrankvila esprimo. Temas pri la studo pri rondaj kaj rektangulaj naztukoj. Jes, tiu mesaĝo apartenas al lia ministerio, sed ĝi estas vere eksplodema. Li preferus eĉ ne transdoni ĝin al la sekreta servo. Tial li unue kontaktas sian plej proksiman asistanton Hartmut Wohlers.

"Hartmut, vi ja estas juristo. Do, ĝuste la ĝusta persono. Enspiru profunde. La naztuko-studo estas falsaĵo."

"Ho ve. Sed ni pli bone tenu tion inter ni. Ĉi tio absolute ne devas fariĝi publika“, emfazas Hartmut.

"Jes, vi pravas. Ni ĵus publikis la regularon por infanĝardenoj kaj lernejoj. Pedagogoj instruu al infanoj ekde frua aĝo, ke rektangulaj formoj estas danĝeraj. Ni ne povas retiri tion."

"Per tiu studo la fabrikanto Krause ricevis nur avantaĝojn. Mi proponas konfidencan konversacion kun li."

Kaj tiel Frank Krause estas invitita al la Ministerio pri Internaj Aferoj. Li tute ne scias la sencon de tio kaj

havas naŭzon. Nun li sidas en la oficejo de la departementa estro Sinjoro Schmidt. Ankaŭ Sinjoro Wohlers ĉeestas. Li iras rekte al la afero:

"Sinjoro Krause, bonvole ne provu trompi nin. Ni scias ĉion. Via studo estas falsaĵo. Ĉu vi povas imagi kion tio signifus por vi?"

Frank sentas sian stomakon streĉiĝi. Li klare konscias, ke nei ĉion ne estus bona ideo. Sed kion nun fari? Antaŭ ol li povas malfermi sian buŝon, la departementa ĉefo Schmidt turnas sin al li:

"Tio povus finiĝi tre malbone, Sinjoro Krause. Sed ni esperas, ke vi kunlaboras."

"Jes, sed, hmm, kiel mi devus fari tion? Kion vi atendas de mi?, demandas Frank timigite.

"Absoluta sekretigo!", emfazas Sinjoro Wohlers, "Absoluta sekretigo. Tio estas esence ĉio, kion ni volas de vi. Ĉu vi komprenas?"

Ne, Franke ankoraŭ ne tute komprenas. La departementestro Schmidt devas klarigi tion pli detale.

Li postulas, ke la firmao Krause ne donu al iu ajn informojn pri la studo. Kiel kompenson la ministerio

promesas sin deteni de procesigo. Por substreki la seriozecon de tiu oferto, Sinjoro Schmidt finas la konversacion per nova promeso:

"Sinjoro Krause, vi ricevos en la venontaj tagoj oficialan leteron de la ministerio kun invito al ceremonio. Tie premio estos prezentita al vi. Ĝi estas la plej alta premio de la ŝtato, la Granda Kruco de Merito kun Stelo."

Tion Frank ne povis imagi tion. Li ne ricevos punon sed eĉ ricevos premion, kiun li tute ne meritas. Aliflanke li nun komprenas, ke li absolute devas klopodi konservi sekretecon. Tio kaŭzas konstantan zorgon.

## Girlando

Inter du arboj etendiĝas ŝnuro kun buntaj balonoj en la ĝardeno. Ĉiu ajn povas vidi tion de la strato. Ina, la fratino de Emily, festas sian dekkvinan naskiĝtagon hodiaŭ. Preskaŭ ĉiuj samklasanoj volas veni. Tial la ĝardeno bezonas esti ornamita eĉ pli. Emily havas ideon. Ŝi rememoras la grandan pakaĵon kun tiuj malnovaj papernaztukoj! Nun nur mankas multaj krokodilklipoj.

"Kial vi bezonas naztukojn kaj krokodilklipojn?", demandas Ina scivoleme.

"Vi tuj vidos tion. Sed kunportu al mi viajn dikajn feltkrajonojn. Vi tuj vidos kial."

Emily nun metas dek tri papernaztukojn plate sur la tablon. Ŝi metas du krokodilklipojn sur ĉiun tukon por pezigi ĝin.

"Mi iĝas dek kvin. Mankas ankoraŭ du papertukoj, ĉu ne?"

"Ne, atendu nur!"

Emily nun pentras grandan literon sur ĉiun naztukon. Kaj jen:

H A P P Y  B I R T H D A Y

Nun estas klare. La rektangulaj papertukoj estas fiksitaj al la ŝnuro per la krokodilklipoj. Maldekstre kaj dekstre pendas la balonoj.

Rapidege faru foton kun la naskiĝtaga infano sub la girlando, kaj la festo povas komenciĝi.

Emily ne atendis tion. Ŝia najbarino Sinjorino Brandt ion ne ŝatas. Emily jam kverelis kun ŝi plurfoje. Ofte temis pri la hundo de Sinjorino Brandt, kiu fekis ĝuste antaŭ la ĝardena barilo. Sed plej ofte ŝi

plendis pri laŭta muziko. Sed hodiaŭ ankoraŭ ne estis muziko.

"Kion ŝi nur volas?"

"Tio ne estas permesita!", ŝi riproĉas, "Forprenu tion tuj!"

Post tiam ŝi malaperas. Unu post unu, la naskiĝtagaj gastoj de Ina alvenas kaj disvastiĝas en la ĝardeno. Ĉiuj estas bonhumoraj kaj ĝuas la bongustajn dolĉaĵojn kaj trinkaĵojn.

Subite polica aŭto haltas antaŭ la domo. Unu policano kaj lia kolegino eliras kaj demandas pri la domposedanto.

"Mia patrino ne estas hejme nun. Mi estas la granda fratino de Ina. Ŝi festas sian naskiĝtagon. Kio estas malĝusta?"

Ni ricevis telefonvokon. Ni bedaŭras, sed via girlando devas esti forprenita", postulas la policanino.

"Kial? Tio tute ne ĝenas iun ajn", demandas Tanja.

"Vi malpravas. Vi uzas rektangulajn naztukojn. Kaj ĝuste pri tio multaj homoj plendas nuntempe. Do,

forprenu ilin, alikaze ni devas interveni", minacas la policano.

Emily ne povas kompreni tion. Sed kion fari? Kontraŭstari la ŝtatan aŭtoritaton? Ŝi ne havas kuraĝon por tio. Sed ŝi havas ideon.

"Bone, mi faras tion, sed nur se vi donos al mi vian postulon kun stampo kaj subskribo. Ina, prenu la notblokon kaj plumon!"

Kompreneble la foto de la naskiĝtaga girlando sukcese aperis sur la fronta paĝo de la loka gazeto. Tiaj girlandoj ne estas kontraŭleĝaj, kiel konfirmis advokato de la Klaraj Pensantoj. La du policanoj, dume, estis instrukciitaj pardonpeti pro sia inter-veno.

Tiu okazaĵo kaŭzis amuziĝon ne nur ĉe la anoj de la Klaraj Pensantoj. Nun videblas similaj girlandoj en multaj ĝardenoj kaj sur multaj balkonoj.

Sed tio ne minacas la rondan naztukon. Ĉiam pli da homoj nun ankaŭ portas rondajn mansaketojn.

## La premio

Tanja estas ravita: "Tre bone, Frank. Vere, vi aspektas tre bone en via kompleto",

"Ĉu mi vere povas akcepti tian medalon de merito?"

"Kompreneble, jes, mi fieras pri tio!"

"Ĉesu, mi ne sentas bone pri tio. Kio okazos, se poste ĉio malkaŝiĝos?"

"Nenio malkaŝiĝos. Mi jam parolis kun Toby. Lia firmao en Usono ne plu ekzistas. Li fuĝis al Kanado kaj fondis novan firmaon tie. Li eĉ ne plu nomiĝas Toby. Li vere estas lerta vulpo."

Tiu informo trankviligas Frank. Li baldaŭ akceptos sian premion en la urbodomo sen stomaka premo. Frank ne povas imagi tion. La urboestro faras specialan laŭdon honore al li! Estas tro multe da laŭdo. Li aŭdas, ke per tiu premio li prenas sur sin grandan respondecon pri la bonfarto de la homoj. Ĉu tio ne estas iom tro? Frank ne certas, ĉu li povas plenumi tiun postulon.

Hejmen alveninte, lia pensado ne ĉesas. Kion li efektive atingis por la homoj? Ili ĉiuj aĉetas ja nun la rondajn naztukojn. Tio evidente alportas grandan profiton por lia firmao. Sed kian profiton ricevas la homoj de tio?

Liaj pensoj estas subite interrompitaj. Krom Anton Tanja ankaŭ vizitis aliajn gastojn. Ĉiuj ĝojas festi

kune kun Frank. Ĉiu volas porti la Grandan Krucon ĉirkaŭ la kolo. Nun Frank petas la parolon:

"Koran dankon, karaj amikoj. Mi vere sentas min tre honorita. Sed estas tro multe da laŭdo, tro multe. Mi ricevis tiun premion nur, ĉar vi subtenis min dum la tuta tempo. Tial vi kompreneble ankaŭ rajtas porti la krucon ĉirkaŭ via kolo. Denove multan dankon al vi ĉiuj, kaj precipe al Tanja."

Jes, estas ŝi, kiu propradire meritis la Krucon de la Merito. Estis ŝi, kiu havis la ideon pri la studo. Sed tion neniu sciu.

## La sekva paŝo

Kiel kutime, Frank iras al sia firmao. Normale, apenaŭ iu ajn estas dumvoje tiutempe, permesante al Frank ordigi siajn pensojn kaj plu pensi pri unu afero aŭ alia. Tio hodiaŭ ne funkcias, ĉar li devas preterpasi grupon da manifestantoj.

Li aŭdas vokojn kiel 'Haltu la stultaĵon!', 'Rektangula estas  sekseca', 'Ronda kaj blanka - Aĉa Stultaĵo!'

Frank enspiras profunde kaj daŭrigas sian vojon. Senpezigite li atingas la enirpordon kaj gapas aeron.

"Nur ne malkvietigi!", komentas Sinjorino Evers, "Ĉiam estas kelkaj, kiuj kontraŭas ĉion. Ili baldaŭ trankviliĝos."

Jes, Frank intertempe trankviliĝis. Li diskutas la pluan planadon kun Anton.

"Ekzakte, vi devas konservi vian pozitivan sintenon. Tio helpis nin jam la tutan tempon", opinias Anton.

Frank nur povas konsenti. Tamen li ne scias de kie li ricevis tiun sintenon. Fine, ĉio subite klariĝas al li.

La kialo por tio devas esti la rondaj naztukoj!

Ili estis tiuj, kiuj ĉion plibonigis! La vendoj de la firmao duobliĝis. Li eĉ ricevis la Grandan Krucon de Merito kun Stelo. Kaj estas io alia, kio alportas al li eĉ pli da ĝojo, lia rilato al Tanja. Hodiaŭ vespere li proponos al ŝi geedziĝon!

Sed antaŭ tio li klarigas al Anton tutan novan ideon:

"Ni bezonas novan sekcion. Kaj estas vi, kiu estros ĝin."

"Pardonu, kio? Ĉu mi estos promociita? Kia sekcio?

"Tenu vin forte, vi laboras ekde hodiaŭ pri la enkonduko de la ronda neceseja papero."

> F I N O <

# Kolofono

**Titolo**
La ronda naztuko

**Originala titolo**
Das runde Taschentuch

**Versio 1.2**
1-a Eldono, 2026, E-libro

**Aŭtoro**
Erik Tantal, alinome Klaus Friese

**Traduko**
Klaus Friese

**Kopirajto**
© Klaus Friese,  Hamburg

**Retpoŝto**
friese@esperanto-hamburg.de

**Hejmpaĝo**
esperanto-klaus.de

**Kovrilo**
Erik Tantal